Mentorada programo de CED

1. Celoj

a. Kuraĝigi, subteni kaj gvidi (relative) novajn esploristojn sur la kampoj de esperantologio kaj interlingvistiko, kiel ankaŭ sur aliaj kampoj interesaj por CED.
b. Stimuli la produktadon de fakaj publikaĵoj sur tiuj kampoj kaj plialtigi ties kvaliton.
c. Kontribui al la plivastigo, interkontaktigo kaj kunlaborigo de la faka komunumo de esploristoj sur tiuj kampoj.

2. Principoj

a. Mentorado povas alpreni diversajn formojn, laŭ la interkonsento de la mentoro kaj la mentorato. Tiu interkonsento estu skriba.
b. Mentorado povas okazi en iu ajn lingvo, ne nepre en Esperanto. Estu tamen instigo, ke mentoratoj akiru almenaŭ leg-kapablon en la lingvo, se ili ne jam posedas ĝin.
c. Unu celo de la mentorado ĉiam estu la produktado de faka publikaĵo, ĉu en skriba formo en faka revuo (ekz. en LPLP, EES, la Jarlibro de la Societo pri interlingvistiko-GIL, ktp, sed eventuale ankaŭ en faka revuo sen rekta ligo al interlingvisitko), ĉu kiel prezento al faka konferenco.
d. Ĉiu interkonsento pri mentorado havu limigitan daŭron, kiun oni komuniku al la CED-estraro komence de la mentorado.
e. Post ses monatoj ekde la komenco de la mentorado, okazu pritakso de la mentorada rilato, ebligante ĝian firmigon, plibonigon, aŭ eventuale eĉ ĉesigon, se al unu aŭ ambaŭ partioj ĝi ŝajnas nefunkcipova.
f. Je la anoncita fin-dato de la mentorado, konciza raporto pri ĝiaj atingoj estu sendita al la CED-estraro. Je tiu punkto eblas renovigi la mentoradon por plia fiksita periodo, se ambaŭ partioj deziras tion.
g. Mentorado ne kuntrenas financajn implicojn nek juran respondecon por CED nek por la mentoroj.

3. Kreo de mentoradaj rilatoj

a. Kandidatiĝo kiel mentorato okazu per letero al la CED-estraro, kiu respondas al demandoj listigitaj ĉe la koncerna paĝo de la CED-retejo. Tiuj demandoj inkluzivu:
    i. Nomon, profesiajn kvalifikojn, kaj esploristajn spertojn de la kandidato;
    ii. Informojn pri ties nuna statuso kiel studento en postdiplomaj studoj, postdoktoriĝa esploristo, sendependa esploristo k.s.

iii. Priskribon de specifaj esplorceloj dum la periodo de la mentorado, kaj kiel ili rilatas al la celoj kaj agadkampoj de CED;
iv. Indikojn pri specifaj aspektoj de la esplorado, pri kiuj la kandidato serĉas gvidon (se estas tiaj);
v. Aliajn faktorojn, kiuj povus influi la mentoradon, ekzemple tempolimoj, necesaj lingvokonoj, k.s.

b. La CED-estraro pritaksu la peton, kaj laŭbezone petu pliajn detalojn antaŭ ol veni al decido, ĉu la kandidato estas taŭga por mentorado sub la aŭspicioj de CED.
c. Sekve de pozitiva decido, la CED-estraro kontaktu esploristojn en la rondoj de CED kiuj posedas la necesajn fakajn sciojn kaj aliajn kapablojn por roli kiel mentoro por ĉi tiu konkreta kandidato. La kontaktoj inkluzivu priskribon de la celoj kaj funckiado de la mentorada programo.
d. Se troviĝas taŭga potenciala mentoro, la CED-estraro iniciatu rektajn kontaktojn inter tiu kaj la kandidato, kaj estu preta laŭbezone helpi kaj konsili pri la difino de la unua periodo de mentorado kaj la klarigo de reciprokaj atendoj kaj bezonoj.

Akceptita de la Estraro de CED, la 9-an de novembro, 2022

Retadreso por rilata korespondado: mtfettes (ĉe) sfu.ca